

Estimataj komitatanoj,

kiel raportite de la Elekta Komisiono en la pli frua [raporto](#), la Elekta Komisiono lanĉis malferman alvokon por trovi novajn estraranojn.

Post vastaj esploroj en kiuj 42 kandidatoj estis konsideritaj, fine 6 homoj sendis sian kandidatiĝon, kvankam unu el ili retiris sian kandidatiĝon antaŭ la limdato. Dumtempe iu el tiuj kandidatoj, Alexandre KADAR, estis elektita Ĝenerala Sekretario. Krome la retiriĝinta kandidato petis nuligi sian retiriĝon. La Elekta Komisiono konsiderante ke la kandidato tiam ĝustatempe sendis kandidatiĝajn dokumentojn kaj akiris la komitatanan subtenon, taksas la kandidatiĝon valida kaj estas jene prezentita, temas pri samideano HUANG Yinbao, pli konata kiel Trezoro.

La kandidatoj estas:

- **Brunetto CASINI (Bruĉjo KASINI)**, proponita de Jegorovas, Pietrzak kaj Vergara.
 - kandidatas kiel estrarano pri Landa Agado en Eŭropo, Kongresoj, Kulturo, Instruado, Merkatiko aŭ Financoj.
- **HUANG Yinbao (Trezoro)**, proponita de Matúšov, Maurelli kaj Spanò.
 - kandidatas kiel estrarano pri Financoj kaj Unesko.
- **Agnieszka Barbara PIETRZAK**, proponita de Corsetti, Gutierrez, Maurelli kaj Spanò.
 - kandidatas kiel estrarano pri Kulturo kaj Kongresoj
- **Orlando E. RAOLA**, proponita de Arquillos, Grosjean, Kovtonjuk kaj Zerbetto.
 - kandidatas kiel estrarano pri Kulturo, Kongresoj, Bibliotekoj, Eldonado aŭ Scienca kaj Faka Agado.
- **Amri WANDEL**, proponita de Cid, Keefe kaj Maurelli,
 - kandidatas kiel estrarano pri Scienca kaj Faka Agado, Landa agado en MezOriento kaj NordAfriko kaj Servoj kaj Reklamado

Ĉiuj kandidatoj estas komitatanoj.

Ni kredas ke ĉiuj kandidatoj estas tre ideohavaj, spertaj kaj valoraj aktivuloj kiuj povas doni tre gravan kontribuon al la estrara laboro de UEA, tamen neniu el ili povas efektive transpreni ĉiujn fakojn kiuj en la Estraro bezonas novan gvidanton. Tial **la Elekta Komisiono rekomendas al la Komitato elekti du novajn estraranojn.**

Konsile pri eblaj teamkunmetoj, ni kredas ke tre gravas zorgi ke en la "kompletigata" Estraro estu estraranoj kiuj povas zorgi pri Financoj, Kongreso, Kulturo kaj Scienca kaj Faka Agado voĉdoni en tiu perspektivo kaj konsekvence pri konsilas pri eblaj teamkunmetoj.

Tial la Elekta Komisiono rekomendas al la Komitato elekti:

1. **Trezoron** kiel estrarano pri Financoj kaj **Orlandon Raola** kiel estrarano pri Kulturo, Kongresoj, Bibliotekoj, Eldonado aŭ Scienca kaj Faka Agado.

Ni kredas ke ambaŭ kandidatoj povus plejbone integriĝi en la estrara teamo kaj konas la asocion ankaŭ plejinterne volontulinte en la Centra Oficejo pasintjare. Cetere Trezoro jam ekspertiĝis pri la financoj de UEA kiel membro de la Komisiono pri Financoj kaj Administrado

kaj de la laborgrupo pri financoj, dum Orlando Raola kiel sciencisto havas senduban sperton en Scienca kaj Faka Agado kaj krome jam ricevis esprimon de subteno de la nuna Estraro por aliĝo al la teamo.

Alternativaj proponoj povus esti:

2. **Trezoro** kiel estrarano pri Financoj kaj Scienca kaj Faka Agado kaj **Bruĉjo Kasini** kiel estrarano pri Kongresoj, Kulturo kaj Merkatiko.
3. **Trezoro** kiel estrarano pri Financoj kaj Scienca kaj Faka Agado kaj **Barbara Pietrzak** kiel estrarano pri Kulturo kaj Kongresoj.

En ambaŭ ĉi tiuj proponoj ni opinias ke Trezoro povus transpreni la fakon pri Scienca kaj Faka Agado pri kiu li pli frue esprimis intereson kaj havas senduban profesion kaj movadan sperton, kvankam li ne plu confirmis la kandidatiĝon pri tia fako.

Bruĉjo Kasini kaj Barbara Pietrzak havas ambaŭ elstaran sperton pri Kongresoj kaj Kulturo kaj ambaŭ estus kandidatoj kiuj povus tre bone fokusiĝi pri tiuj fakoj, eĉ se kun klare malsama aliro kaj fokuso.

4. **Bruĉjo Kasini** kiel estrarano pri Financoj, Kongresoj kaj Merkatiko kaj **Orlando Raola** kiel estrarano pri Kulturo, Bibliotekoj, Eldonado kaj Scienca kaj Faka Agado.

Ankaŭ ĉi tiu propono ebligus kovri la diversan fakaron kun flekseblo rilate la fakojn Kongresoj kaj Kulturo pri kiuj ambaŭ Bruĉjo Kasini kaj Orlando Raola disponeblas.

5. **Bruĉjo Kasini** kiel estrarano pri Kongresoj, Kulturo, Merkatiko kaj Financoj kaj **Amri Wandel** kiel estrarano pri Scienca kaj Faka Agado, Landa agado en MezOriento kaj NordAfriko kaj Servoj kaj Reklamado.

Ĉi-lastata propono donus plejan fokuson al Scienca kaj Faka Agado kun estrarano ĉefe orientita al tiu fako kaj aldonus reprezenton en la Estraro de Meza Oriento. Aliflanke ĝi ankaŭ kumuligus Kongreson, Kulturon kaj Financojn sur sama homo, kio estus sendube tre signifa ŝarĝo.

Procedure la Komitato unue voĉdonu pri la propono elekti du novajn estraranojn.

Se tiu propono estos malakceptita, ĝi tiam voĉdonu pri la propono elekti unu novan estraranon.

Kaze de pozitiva rezulto, sekve de la voĉdonado(j) pri la nombro da estraranoj, okazos voĉdonado (aŭ voĉdonadoj kaze je nesukcesa elekto) pri la elekto de novaj estraranoj.

La kandidatiĝdokumentoj estas alkroĉitaj, rilate al Bruĉjo KASINI kaj Orlando RAOLA ili pluenhavas referencon al la posteno de Ĝenerala Sekretario al kiu ili unue kandidatiĝis.

Samideanajn salutojn

La Elekta Komisiono

(Michael Boris Mandirola, Guy Matte kaj Ileana Schröder; Dietrich Michael Weidmann decidis ne partopreni la preparadon de ĉi tiu raporto.)

Brunetto CASINI (Bruĉjo KASINI)



Biografieto

Bruĉjo Kasini naskiĝis la 23-an de majo 1954, en Pizo.

Li eklernis Esperanton en 1970.

En 1972 li organizis, kune kun Giuseppe Martini, la 43-an Italan Kongreson de Esperanto en Pizo (poste, ili tie denove okazigis la Kongreson en 1987 kaj en 2007).

En 1973 li estis elektita en la estraro de la Itala Esperantista Junularo (IEJ), kaj en 1974 li iĝis Ĝenerala Sekretario de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, posteno kiun li tenis, daŭre reelektita, ĝis 1980. De 1980 ĝis 1981 li estis Vicprezidanto de TEJO.

En 1977, kiel estrarano de IEJ, li ankaŭ lanĉis la Internacian Junularan Festivalon (IJF), kiu rapide fiksiĝis kiel unu el ĉefaj internaciaj junularaj kunvenoj de esperantistoj.

En 1977 li fondis la eldonejon Edistudio, kiu transprenis la distribuadon de la libroj jam de li eldonitaj pere de la eldonejo "La nuova frontiera"; Edistudio ĝis nun eldonis en Esperanto centon da libroj, muzokkasedoj kaj KD, filmo, revuoj.

La 13an de decembro 2009 la Konsilio de Fondumo Zamenhof (Bjalistoko, Pollando) elektis lin prezidanton de la Fondumo por la trijara periodo 2010-2012.

Plurfoje li estis komitatano de UEA, kaj li rolis en la Financa Komisiono kaj poste kiel Komitata Kont-revizoro de la Asocio.

Plurfoje li estis komitatano kaj estrarano de IEF, kun respondecoj pri informado, kongresoj, instruado.

De septembro 2017 li fariĝis kundirektoro de la revuo "Heroldo de Esperanto" kun Fabricio Valle.

Motivoj de la kandidatiĝo

Membroj de la elekta komisiono demandis mian pretecon, kaj mi konsideras devon meti miajn konojn kaj spertojn je servo de la Esperanto-movado, se ĝi sentas bezonon je ili

Movadaj kaj poroficaj celoj

Mi estas preta okupiĝi pri tio, kion oni volas asigni al mi, vidinte miajn antaŭajn spertojn kaj atingojn.

Miaj kompetentoj estas ĉefe kiel organizanto kaj plananto.

Mia percepto de la movado estas aktuale ke ĝi havas pli da ŝancoj ol ŝajne esperantistoj atribuas al ĝi, sed ke ĝi bezonus multe pli da profesia engaĝiĝo; sekve, ĝi devus eltrovi kiel pli serioze financi sin por povi pagi profesiajn servojn ankaŭ interne se sia membraro.

Roloj akcepteblaj. Mi estas principe je dispono por ajna el la postenoj, se vi taksas ke mi havas la de ĝi postulataj spertojn kaj kapablojn.

Mi pretas akcepti la rolon de **Ĝenerala Sekretario**, komprenante ke ĝi antaŭvidas kunordigi sub la direkto de la Prezidanto kaj helpe al li, la laboron de la tuta estraro kaj harmoniigi la

laboron de ĝi kun la ceteraj instancoj de la Movado (en la kazoj kiam ne estas jam alia estrarano pli specife destinita al tiu unuopa kunlaboro), laŭbezzone anstataŭi alian estraranon, gvidi kun la Ĝenerala Direktoro la administradon de la Asocio.

Tute same volonte mi pretas akcepti kandidatigon por **sentitola estraraneco**. Kiel specifaj estraraj taskoj, mi havas sperton kaj pri **Landa agado (Eŭropo)**, kaj pri **Kongresoj**, pri **Kulturo**, pri **Instruado**, pri **Merkatiko**, pri **Financoj**. Sciante ke oni planas sekvi la kutimon atribui al estrarano pli ol unu tasko, mi pretas akcepti respondecon pri unu aŭ pluraj el ili, ĉu kiel estrarano, ĉu kiel ĜS, petante ne troigi kun taskigo, por la bono de ni ĉiuj.

Specife pri la diversaj respondecoj mi provas klarigi kion mi dezirus fari, por plenumi taskon, se al mi ĝi estos donita.

Pri **Landa agado (Eŭropo)** mi perceptas, ke la evoluigantaj politikaj situacioj en Eŭropo donas apartajn ŝancojn al Esperanto plifortigi sian situacion, ĉu pro la foriro de Britujo el Eŭropa Unio (kun la konsekvenca foriro aŭ almenaŭ signifa malfortiĝo de la angla lingvo el sia nuna tro elstara pozicio), ĉu pro la baldaŭa eniro de pluraj novaj landoj en la Unio mem, ĉu pro la premoj politikaj kaj sociaj de lokaj situacioj kiel la kataluna, kiel la ukraina; kaj ankaŭ la kulturaj kaj sociaj evoluoj en pluraj landoj de Eŭropo, direkte al pli forta substreko de sia kultura individueco proponas, se bone komprenataj kaj prudente espluatataj, fortigi la rolon de la internacia lingvo. Aliflanke pluraj LAj suferas krizojn, kiuj havas plurajn komunajn punktojn kun UEA, ekzemple pri membrofalo, kaj la gvida rolo de la Asocio devas ilin helpi kuraĝe alfronti tiujn krizojn kaj trovi la manierojn ilin superi.

Pri **Kongresoj**, mi havas la percepton, ke UK restis tro ne-ŝanĝita dum la lastaj centdekdu jaroj; prudente gardante la tradicion, mi pensus provi grandigi ĝin per la altiro de relative grandaj grupoj el landoj kiel la aziaj, afrikaj kaj sudamerikaj, trovante la manieron proponi eblecon de ilia alveno kaj gastigo je por ili akcepteblaj prezoj kaj kondiĉoj; mi referencas, pensante al tio, al la grandaj kunvenoj de la mondaj eklezioj, de la skoltoj, ktp, ne volante per tio renversi la tradiciajn aspektojn de niaj UK, sed apud-metante al ili aliajn ŝancojn partopreni.

Pri **Kulturo**, Esperanto havas devon kaj ŝancon, ĝis nun tro neglektita, ĉeesti ĉiujn gravajn mondajn eventojn, ilin akompani kaj reliefigi. Por tio oni devus speciale trovi apartajn financajn subtenojn, sed kutime pli facilas trovi kiu sponsoras kulturon ol aliajn temojn.

Pri **Instruado**, la Movado bonŝance povas kalkuli pri Institucioj kiel ILEI kaj IIE, kiujn UEA povas kaj devas apogi kaj kun kiuj endas kunlabori. Instruado de Esperanto devos iel denove fariĝi aktuala prioritato de ni, kaj tra ni de pluraj landoj de la mondo, se ne tuj de ĉiuj. Por tion atingi, ni devas ne lasi solaj la aliajn movadajn instituciojn, kiuj pri tio mem okupiĝas.

Pri **Merkatiko**, kiun mi komprenas esti nova ideo de respondeco, mi havas signifan sperton en la nacia merkato sed mi ne tro alfrontis la problemon en Esperanto; mi bezonus unu aŭ du monatojn da studo de la situacio por povi fari konkretajn realigeblajn proponojn.

Pri **Financoj**, fine sed ne fone, evidentas ke la ĉefa demando nun estas trovi pliajn, verŝajne novajn, enspezo-fontojn, se oni deziras gardi la elspezokvanton. Ankaŭ pri tio mi ne havas en la poŝo solvojn, sed mi kredas ke vi ne esperis tion. Estas problemoj studenda kaj solvenda sed, se temas pri mono, solvoj devas esti troveblaj, kun la helpo de la aliaj Asociaj instancoj.

(Trezoro) HUANG Yinbao

Biografieto

Trezoro Huang Yinbao, naskita en 1962, estas direktoro de Esperanto-Centro *Ora Ponto*. Li diplomiĝis en Agrikultura Lernejo Pingling en 1983, Administra Fakultato de Centra Komunista Partio de Ĉinio 1994. Inter 1983 ĝis 2011 kiel ŝtata oficisto li laboris sekretario kaj prezidanto de Scienc-Teknika Komitato Jinghuan, prezidanto de Scienc-Teknika Buroo de Jingchuan-Gubernio, estro de subgubernio Feiyun. En 2011 li, petinte emeritiĝon, fondis Esperanto-Centron por libere labori por Esperanto, estis direktoro de Investa Kompanio *Ora Ponto* (2013- aprilo de 2017), kiu subvenciis la Esperanto-Centron *Ora Ponto*.



Trezoro Huang Yinbao esperantistiĝis en 1983, kaj kune kun internaciaj samfakanoj fondis Internacian Agrikulturan Esperanto- Asocion (IAEA). Li publikigis 10 sciencajn raportojn en Esperanto pri agrikultura scienco en *Scienca Revuo* kaj *Internacia Agrikulturo* (IAEA). Li estas dumviva membro de UEA, sekretario de ILEI (2011-2012), kunlaborinto por Esperanto-Insulo (2010-2012), Konstata komitatano de Ĉina Esperanto-Ligo (2013-), vicsekretario de Ĉina Esperantista Instruista Ligo (2012-), UEA-konsiliano (2013-), komitatano C de UEA (2016-), estrarano de ISAE (ekde januaro de 2017), ĉina peranto de UEA (2013-), *Monato*, *La Ondo de Esperanto* kaj *La Gazeto*; premiito de UEA pro elstara agado en 2012, premiitoj de Ĉina Esperanto-Ligo [ĈEL] pro elstaraj agadoj en la Esperanto-Movado en 2009-2011, 2012-2013 kaj en 2014-2015. Li faris prelegojn pri diversaj temoj en UK-, IKU- kaj ILEI-konferencoj, naciaj kaj lokaj konvenoj en Danio, Germanio, Francio, Belgio, Argentino, Nepalo, Koreio, Ĉinio kaj en Unesko, kungvidis Orientan E-Seminarion (AMO3) en aŭgusto 2014 kaj la UEA-Seminarion (AMO20) en Nepalo (2016). Li fondis Esperanto-Centron *Ora Ponto*. Li volontule laboris en CO de UEA du monatojn en aŭgusto kaj oktobro 2016.

En la jaro 2017, li fondis la kvaronjaran revuon *Tra la mondo*, iniciate lanĉis la revuon *Unesko-Kuriero* en Esperanto, kiu estas akceptita de la retejo de Unesko, eldonis la ĉinlingvan libron *Per Esperanto al la mondo - La tagoj de miaj volontulaj laboroj en Centra Oficejo de UEA*. En decembro 2017 li estis proklamita *La Esperantisto de la Jaro 2017*. Pli da informoj pri lia agado, aperas en [Vikipedio](#), [Intervjuo de ĈRI](#), [Tra la mondo](#) kaj *Esperanto ĉiam vivos kaj finfine sukcesos - Intervjuo kun Trezoro Huang Yinbao* en la 2-a numero 2018 (p.32-38) de *La Ondo de Esperanto*.

Motivoj de la kandidatiĝo

Proponite de la Elekta Komisiono, mi kandidatiĝis al UEA-estrarano, sed retiriĝis la 30-an de novembro 2017 antaŭ la limdato pro persona kialo. Post la retiriĝo mi vidis multajn bonajn proponojn por UEA. Tamen mi dubas ke UEA povus plene solvi la deficiton, nur per multigo de individuaj membroj kaj ties kotizoj, kaj redukto de la elspezoj, ĉar la individuaj membroj daŭre maljuniĝas kaj malmultiĝas. Kelkaj proponoj ŝajne bonus, ekzemple: malmultigo de

oficistoj, transloko de la Centra Oficejo, libroserva transdono al aliaj organizoj, nuligo de la paperaj gazetoj, tamen tio malfortigus la Asocion. Mi pensas ke UEA finfine mortus, se ni serĉadus rimedojn nur en la fermita sako (insulo) Esperantujo. Aliflanke, mi vidas ke neniu el aliaj kandidatoj kandidatiĝas nur por la estrarano pri financo, mi pensas ke mi povus kontribui al la Asocio, ĉar mi kiel libera esperantisto plentempe laboras por Esperanto. Do mi petas nuligi la retiriĝon kaj denove kandidatiĝi al la Estrarano pri Financo. Mi pretas daŭre kontribui ankaŭ en la kampo pri Unesko, ĉar mi kiel ĉefredaktoro de *Unesko-Kuriero* bone rilatas kun ĝi.

Movadaj kaj poroficaj celoj

Videbligi kaj disvastigi Esperanton per malfermado, plibonigi la financojn per vasta kunlaboro, plibonigi la rilatojn kun Unesko per la Kuriero.

Mia volontula laborado en CO en 2016 naskis la projekton *Unesko-Kuriero* en Esperanto. Kun apogo de la Ĝenerala Direktoro kaj la Estraro, mi kiel membro de la Financa Komisiono refoje volontule laboros en CO ekde la lasta semajno de Marto 2018. Profitante la ŝancon mi planos esplori la realigeblecon pri la malfermado kaj kunlaboro.

1. Malfermi UEA-n por serĉi financon kaj moralan subtenon ekster Esperantujo

Pene kunlabori kun diversaj ne-Esperantaj organizoj, landaj registaroj, universitatoj, entreprenoj, diversaj famuloj kaj riĉuloj por serĉi financon kaj moralan subtenon ekster Esperantujo. Se ni pensas pri la ne-esperanta publiko, la publiko pensos ankaŭ pri nia lingvo.

2. Malfermi UK-n por serĉi financon kaj moralan subtenon ekster Esperantujo

Sub-titoligu la tradician titolon *La xxx-a Universala Kongreso de Esperanto* kaj elektu ĉefan titolon kiu povus forte kaj okulfrape allogi la plejvastan publikon: la kongresajn landajn registarojn, NRO-jn, eĉ UN kaj Unesko, ktp.

Sub la principo ke la kongresoj okazu ĉiam en Esperanto, UEA rajtigu la kongresajn landajn registarojn decidi pri la ĉefa titolo de la kongreso laŭ la plej aktualaj punktoj de la landoj aŭ la mondo. Ekzemple por la 103-a UK, se Portugalio ege interesiĝus pri turismo aŭ pri envicigo de la portugala lingvo inter la UN-lingvoj (laŭ mia scio, la prezidanto de Portugalio ege pledis por tio), la ĉefa titolo povu esti *Universala Kongreso pri Turismo* aŭ *Universala Kongreso pri Portugalaj Lingvo kaj Kulturo*. Se ĝi okazus en Ĉinio, la titolo povus esti *Universala Kongreso pri Zono kaj Vojo*, kiu temo estas lanĉita de la ĉina prezidanto. Ni povus elekti ĉefan titolon *Universala Kongreso pri Subteno al Unesko*, se ni volus interesigi kaj inviti la Ĝeneralan Direktoron de Unesko en la jaro 2018 dum Usono intencas malmembriĝi.

La kongresaj rezolucioj ĉiam estu aktualaj temoj por la kongresaj landoj eĉ por la tuta mondo, kaj ĉiam interesu ne nur nian esperantistaron, sed ankaŭ la landajn registarojn. Kaj ni devas tuj traduki ilin en kongreslandaj lingvoj, kaj plejeble en diversaj naciaj lingvoj. Post la malfermo, la kongresaj landaj gvidantoj kaj la civitanoj, naciaj ĵurnaloj, diplomatoj de diverslandaj ambasadorejoj en la kongresaj landoj, kaj NRO-j rilataj al la kongresa titolo, certe mirus ke miloj da homoj el cent landoj kongresas pri iliaj temoj per Esperanto sen interpretistoj. Ili ĉiuj aŭtomate laboros por ni esperantistaro kiu kongresis longtempe en la fermita sako (insulo) Esperantujo. Tial financa kaj morala subteno estus facile haveblaj. Eĉ iu prezidanto el kongresaj landoj povus saluti la kongresojn letere eĉ ĉeeste.

Se niaj kongresoj bone rilatas kun aktualaj punktoj de la kongresaj landoj, ili certe subtenos nin.

3. Malfermi la Centran Oficejon por serĉi financon kaj moralan subtenon ekster Esperantujo

Funkciigi oficejojn en ĉiuj kontinentoj, varbi volontulajn oficistojn por la kontinentaj oficejoj. Ili unue volontule trejniĝu en CO, kaj poste laboru en siaj oficejoj. La volontulaj oficistoj ricevu modestajn honorariojn, rajtu senpage aliĝi al UEA kaj UK, kaj mem serĉu kaj financu oficejojn. Kontinentaj komisionoj, landaj asocioj, fakaj asocioj, Esperanto-Centro aŭ ne-Esperantaj organizoj eĉ firmaoj povas tute senpage liveri laborejojn por la kontinentaj oficejoj.

Al la volontulaj oficistoj en la kontinentaj oficejoj necesas disdoni CO-taskojn, kiujn povas plenumi volontulaj oficistoj sen ĉeloka zorgo de CO-oficistoj.

La parte liberigitaj oficistoj de CO ĉefe gvidu kaj trejnu volontulajn oficistojn, okupiĝu pri plibonigo de aliaj laboroj kaj servoj de UEA, pri plibonigo de la kontinentaj oficejoj.

La parte liberigitaj oficistoj havu profitcele novajn taskojn kune kun rilataj estraranoj - i.a. *esplori eblecojn* por:

- **eldoni nacilingvajn librojn** kunlabore kun naciaj eldonistoj kies honorarioj venu nur el la profito de la eldono. Ni povas facile trovi tiajn kunlaborantojn en Ĉinio.
- **funkciigi familian gastejon** registritan ĉe *Airbnb* per Volontula Domo.
- **funkciigi kursojn pri diversaj lingvoj** en CO kaj Volontula Domo.
- **funkciigi seminariojn** aŭ ekspoziciojn regule en CO.
- **funkciigi firmaon** en la spaco de CO kaj Volontula Domo.
- **establi mondajn premiojn** pri la kongresa temo, la premiitoj povas esti organizoj, personoj, libroj eĉ artikoloj rilataj la kongresaj fakoj.
- **havi komunan volontulan oficiston** de fakaj asocioj. La fakaj asocioj pagu la honorarion de la komunan oficiston.
- **serĉi ne-esperantajn kunlaborantojn**, subvenciantojn, kongresajn landojn.
- lanĉi novajn projektojn por **varbi subvenciojn kaj donacojn**.
- **profiti per la biblioteko** en CO.
- **funkciigi turisman servon** per la resursoj de UEA.
- **plibonigi** la UEA-fondusojn **per teknikaj manieroj**, ekzemple, videbligi la kontribuantojn en la retejo de UEA, ktp, senpage tranoktigi la vizitantojn kiuj povus kontribui grandajn sumojn al la volontula domo, nomumi la ĉambrojn en la Volontula Domo per la nomo de grandaj donacantoj.
- **utiligi** la Esperantistajn kaj ne-esperantistajn **aktivulojn tra la tuta mondo**, per ekzemple, nomumo de komisiitoj, volontulaj oficistoj, kaj diversaj diversaj premioj.

Agnieszka Barbara PIETRZAK



Biografieto

Kun Esperanto konatiĝis skoltaĝe en 1958, kio ebligis jam la sekvan jaron partopreni la unuan E-aranĝon, t.e. Internacian Infanan Kongreseton. Baldaŭ poste aliĝis al la Pola E-Asocio 1962-65 (kaj ekde 2007), aktivis en la Pola E-Junularo kaj TEJO.

Kunlaboranto de PEJ-revuo "Tamen". Eksa (2012-2014) estrarano de Pola E-Asocio kaj la ĉefredaktoro de "Pola Esperantisto".

Specialistiĝinte pri la pola filologio en la porinstruista supera lernejo sian multjaran profesion karieron ligis kun la E-Redakcio de Pola Radio, kiel ĵurnalistino, redaktoro, parolistino, tradukistino, kaj fine la Estro de la Redakcio. Daŭra kunlaboranto de la novformulaj E-programoj de Pola Radio post 2007 kaj kunorganizado de Pola RetRadio en Esperanto ekde 2011. Verkas ĉefe pri temoj (kaj tradukas el verkoj) ligitaj kun la pola kulturo. Multan lokon en la verkado okupas ankaŭ la E-komunumo: kulturo, movado, radiofonio.

Ĝenerala Sekretario de UEA (2007-2013), estrarano pri kulturo kaj kongresoj (2013-2016).

Membro i.a. de Akademio de Esperanto, Literatura Akademio de Esperanto.

Komitatano C ekde 2007, komitatano B ekde 2010.

La motivoj de kandidatiĝo

La E-kulturo kaj kongresoj estas senĉese unu el la fokusoĵoj en mia ĵurnalista laboro. Responde al la alvoko de la Estraro kaj Elekta Komisiono mi deziras helpi en la estrara laboro koncerne kulturajn aferojn kaj kongresojn, utiligante spertojn akiritajn i.a. en la oficperiodo 2013-2016.

Deklaro pri la movadaj celoj.

Kiel miajn movadajn celojn mi konsideras laborojn por fortigi la organizan funkciadon de UEA utiligante la potencialon, kiun reprezentas individuaj membroj de la Asocio.

Daŭrigi kaj subteni klopodojn proksimiĝi kunlabore al aliaj organizoj, kiuj havas similajn kaj kongruajn celojn kun UEA. Fortigi la identecosenton de UEA-membroj kun sia tegmenta asocio kaj logi eksterasociajn E-parolantojn por realigi konkrete difinitajn celojn. Reliefigi la potencialon de UEA kaj la tuta E-komunumo en la interkultura dialogo kaj interŝanĝo kaj helpi al pliaj sukcesoj tiukampe.

Orlando E. RAOLA

Biografieto

Mia biografieto: Naskiĝis en Havano (1955). Diplomiĝis en Universitato de Havano pri Kemio (1978) kaj pri Juro (1986). Magistriĝis pri Kemio en Ŝtata Universitato de Kalifornio (1999) Doktoro pri Kemio (UC Santa Barbara, 2005) kaj profesoro pri kemio ĉe Santa Rosa Junior College. Esperantisto ekde 1984. Ekaktivis en la kuba movado kaj dum kvar jaroj laboris profesie por Esperanto, kiel libro-eldonisto kaj radioĵurnalisto. Ankaŭ agadis internacie: LKKano kaj preleganto por la 75a UK, preleganto en pluraj okazoj ĉe la Internacia Kongresa Universitato (kaj en la 7a. TAKE en Montrealo 2008), Prelegis kaj rolis kiel aktivula trejnisto kadre de la AMO-seminarioj de UEA en Horany, Hungario (2014) kaj en Havano (2015). Reĝisoro de la kongresa temo en 2013. Kunorganizanto de la Esperantologia Konferenco kadre de la Universalaj Kongresoj ekde 2015. Ekloĝis en Usono en 1994, kaj tuj ekaktivis en la loka (San Franciska golfo), Kalifornia kaj tutlanda movadoj. Estrarano de Esperanto-USA (1988-2007) kaj denove en 2010. En 2011 elektiĝis prezidanto de la landa asocio, kaj restis dum du periodoj en tiu ofico, ĝis 2017. Instruis Esperanton dum pluraj jaroj en Kubo kaj en la Somera Kursaro ĉe Universitato de Kalifornio San Diego (2010). Sukcese trapasis C-1 nivelon de "Origo" Esperanto internacia ekzameno. Membro de la Akademio de Esperanto ekde 2015, estro de la Sekcio pri Faka Lingvo. Okaze de mia sabata forpermeso dum 2017 volontulis dum du monatoj en la Centra Oficejo de UEA, ke mi okupiĝis precipe pri kreado de la elektronika katalogo por Biblioteko Hodler kaj pri aktualigo de la manlibro por novaj membroj.



Motivoj de la kandidatiĝo

Estimataj komisionanoj-membroj de la Elekta Komisiono, estraranoj kaj komitatanoj:

Jen mi deklaras mian intencon kandidatiĝi por la Estraro de UEA. Ĉi momente mi estas Komitatano (A por Usono).

Mi volas eniri la Estraron en tiu ĉi elekto, por kontribui laŭ miaj fortoj kaj kapabloj al stabiligo de la laboro, de la membraro kaj de la financa stato de la Asocio. La Estraro kiun ni baldaŭ elektos alfrontos situacion kiu postulas multajn gravajn kaj neprokrasteblajn decidojn. Mi volas respondece, pacience kaj kunlaboreme helpi al atingo de decidoj kiuj estu la plej efikaj, ĝustaj, demokratiaj, tiuj kiuj subtenos la ekzistokialojn de la asocio kaj kiuj donos ekvilibrans konsideron al la interesoj de niaj membroj, aktivuloj kaj gvidantoj en ĉiuj landoj kaj mondopartoj.

Sed la ĉefa rolo de la Estraro de la Asocio certe ne estas diktatorece decidi kion ni faros kaj kiel ni tion faros elde la komforto de Centra Oficejo. Mi vidas mian rolon kiel Estrarano multe pli kiel ebliganto, kiel kunliganto, kiel entuziasmiganto. La Asocio apartenas al ni ĉiuj kaj la rolo de la gvidantoj fokusiĝu al decidoj kiuj sukcesas kunligi kaj kunlaborigi kiel eble plej multajn homojn. Unuavice, tio rilatas al aktivigo kaj partoprenigo de ĉiuj komitatanoj de la

Asocio. Nia plej supera instanco dum jaroj konsistis de minoritato de sufiĉe aktivaj kaj laŭtaj voĉoj kaj de plimulto de silentemaj kaj ne tre agemaj oficohavantoj. Tio tute ne helpas al la realigo de la bezonataj ŝanĝoj kaj alĝustiĝoj, kaj mi esperas, ke ni sukcesos doni novan energian kaj elanon al la Komitato de UEA.

Ni multe parolis dum la lasta jardeko pri renovigo, pri la dudek unua jarcento, pri la nova jarmila generacio. Sed atenta rigardo al nia agado nuntempa, al nia Centra Oficejo, al nia retejo, al nia revuo kaj al nia kongreso malkaŝas, ke ni, kiel Asocio, ne sukcesis liveri nek alinterne (al la membraro) nek alekstere (al la mondo) kion ni priparolis kaj promesis. Ĉio ne estas negativa kaj okazis pluraj sukcesoj, sed ankoraŭ longegas la irenda vojo. Ĝia nuna celo estos kompreneble haltigi la malpliigon de la membraro kaj la zorgigan ŝrumpadon de nia Asocia kapitalo, kaj en tiu direkto, mi ankaŭ pretas sinofere labori.

Mi komprenas, ke nun ne estas la ĝusta momento por turni nin unu kontraŭ la alia, kaj serĉi kulpulojn aŭ eĉ pli damaĝe, propekajn kapojn. Ni ne estas tiom fortaj, ke ni povas luksi internajn kverelojn kaj malpacon. Do la unua principa deirpunkto de mia laboro en la nova estraro estos la bonvolo akcepti ĉiujn, bonvolo agnoski, ke ĉiu aparta homo havas ion por kontribui al la komuna sukceso kaj ke la taskoj antaŭ ni kaj niaj revoj kaj ambicoj estas sufiĉe vastaj, tiel ke ĉiuj kiuj tion deziras povas senprobleme trovi niĉon kaj dediĉi ĉiujn siajn fortojn kaj disponeblan tempon al iu aŭ alia aparta tasko kun la rezulto de komuna profito kaj ĉiesa bonfarto.

La supre menciita plureco de vojoj kaj laboroj devas nepre esti akompanata de klara kaj malkomplika celaro. Celaro kiun iu ajn asociano povu resume esprimi, ĝisfunde kompreni, entuziasme entrepreni. Provizi tiajn gvidajn dokumentojn nun estos ja gravega tasko, por kiu mi pretas eklabori tuj.

Mi neniam kaŝis la fakton, ke mi preferata laborsfero estas tiu direktita al flegado kaj evoluigo de la Esperanta kulturo kaj komunumo. Eĉ se mi komprenas ĝisfunde la gravecon porti Esperanton al neesperantistoj kaj aŭdigi nian voĉon en internaciaj forumoj diverspecaj, mi certas, ke multaj aliaj asociaj aktivuoj povas fari tion pli efike kaj pasie ol mi mem. Do, unu el la postenoj por kiu mi kandidatiĝas estas tiu de Estarano kun respondecoj pri kulturo, kongresoj, bibliotekoj, eldonado, scienca kaj faka agado. Mi ankaŭ pretas transpreni la taskaron de la Ĝenerala Sekretario, kie mi povus esti utila, aparte dum periodo de transformiĝo kaj renovigo, kiam la okupiĝo pri la kultura agado, kvankam same grava, tamen ne estas tiom urĝa.

Movadaj kaj poroficaj celoj

Mi daŭre reasertas miajn movadajn celojn de antaŭ tri jaroj:

1. La starigo de Centro por Kultura Evoluigo, vere entuziasmiga ideo, kiu plenigos vakuon jam delonge sentatan en nia tegmenta organizo, mi antaŭvidas esti rekte ligita al ĝia kunkreado kaj ekfunkciigado.
2. La plibonigo de tiu kroma teksaĵo kreita ĝuste de Esperanto mem sur la tuta teksaĵo provizita de la novaj elektronikaj komunikiloj.
3. Venigi la eldonan agadon de la asocio al la nivelo de la 21a jarcento estas tasko tute entreprenenda, pri ĝi mi ankaŭ planas plene kontribui surbaze de mia fakaj spertoj tiukampaj.
4. Pligrandigo de la graveco kaj alirebleco de la Universalaj Kongresoj, plena uzo de la


nuntempaj komunikiloj por venigi la kulturan unikaĵon kiu ni kunkreas ĉiujare al izoluloj kaj nepagipovuloj, al tro okupitaj homoj, resume, al ĉiuj kiuj tra la mondo kapablos ĝui kaj profiti el tiutipa partopreno.

5. Kunhelpi al plifirmigo kaj pliefikigo de la helpaj solidarecaj ligoj inter homoj loĝantaj en malsimilaj partoj de la terglobo kaj eĉ homoj de diversaj sociaj tavoloj loĝantaj en la sama regionoj. La eblecoj sur tiu ĉi kampo estas senlimaj, kaj la sukcesoj grave plivalorigas la lernadon kaj utiligadon de Esperanto kiel internacia komunikilo peranta helpon inter la homoj cele al pli justa kaj daŭripova mondo.

Mi komprenas, ke temas pri ambicia laborkampo, sed mi certas, ke mi ne estos sola, ĉar nur se mi kaj la ceteraj estraranoj fariĝas modeloj por kunlaboro kaj sukcesas kunlaborigi multege da aliaj homoj tra la tuta mondo, ni sukcesos realisme kaj longperspektive atingi la celojn starigotajn.

Mi esperas ke la asocio plupaŝu en la entrepreno provizi la homaron per pli justa komunika ordo, por ke ĉiuj ĝuu la eblecon je komuniĝo sen lingva diskriminacio, sen superuloj kaj subpremitoj, en ebena kaj egaleca nivelo.

Amri WANDEL



Biografieto

Amri WANDEL (1954) estas [israela](#) astrofizikisto kaj [esperantisto](#). Profesoro pri [astrofiziko](#) en la [Hebrea Universitato de Jerusalemo](#). Specialisto pri aktivaj [galaksioj](#), [nigraj truoj](#) kaj [astrobiologio](#), membro de la [Internacia Astronomia Unio](#). Verkis librojn, retajn kursojn kaj centojn da sciencaj kaj popularaj artikoloj pri astrofiziko kaj astrobiologio. Estis intervjuita pri astrobiologio por rusa televida filmo (<https://www.youtube.com/watch?v=rCkBZr6yg14&feature=youtu.be&t=4472>) spektita de 5 milionoj.

En esperantujo li estas prezidanto de la [Akademio Internacia de la Sciencoj](#) (ekde 2016) kaj membro de la [Akademio de Esperanto](#) ekde 1992. Estis Estrarano kaj prezidanto (1981-1983) de [TEJO](#) kaj [estrarano de UEA](#) (1995-1998, 2004-2007 kaj 2010-2013). Ekde 2007 li estas sekretario de la [Internacia Kongresa Universitato](#), fondinto (2007) kaj daŭra rektoro de la [Internacia Vintra Universitato](#). Enlande li estas prezidanto de [Esperanto-Ligo en Israelo](#) (1990-1996, 2009 ĝis nun).

Motivoj de la kandidatiĝo kaj movadaj kaj poroficaj celoj

Jam de Nitra mankas **estrarano pri Scienca kaj faka agado**.

Tiun taskon mi plenumis en pluraj iamaj estraroj, kaj ĝian scian parton mi efektive plenumas ankaŭ nun (i.a. kiel IKU-sekretario, organizanto de IKU, Scienca Kafejo kaj Scienca Forumo kaj ĉi-jare ankaŭ redaktoro de la IKU-libro).

Por la venonta jaro mi planas produkti same altkvalitan sed pli malmulte koston.

Mi ŝatus daurigi la proksimiĝon kaj kunlaboron inter UEA kaj la sciencaj organizaĵoj, AIS, ISAE, STEB, kaj provi krei eksterajn rilatojn kun sciencaj instancoj.

La fakaj asocioj estas apenau traktitaj. Fakte multaj apenau ekzistas. Por kelkaj el ili utilis se UEA intervenus por proponi pli efikan sistemon por kontakto kun iliaj membroj, eventuale kadre de la nova UEA-retejo.

Cetere mi povus helpi en la fakoj de **servoj kaj reklamado**, i.a. inter la retaj kursanoj de Duolingo, kaj **regiona agado (MONA)**, pri kiuj mi jam iom okupiĝis lastatempe.

Mi zorgas sekvas la evoluojn en la CO, aparte la mankon de spertaj oficistoj. Mi esperas ke troviĝos la formulo por surloka respondeculo (Ralf?) kaj ke estu pli da kontakto inter la estraro kaj la CO.